<sup>1)</sup> Извращенность.

da Diablo), skribita de li ankoraŭ antaŭ 10 jaroj, kiu laŭ la cenzuraj kondiĉoj estis malpermesita ĝis nun. Heroo de tiu ĉi romano Peredonov fariĝis jam nomo speca, kiel simbolo de mallumo de l'animo, malĉastemeco kaj malprudento. „Peredonovŝĉina“—tio estas, vera strio el rusa vivo, vera epopeo kiel „Obломovŝĉina“, „Karamazovŝĉina“. Nun estas presata lia nova romano pri nuntempa temo „Navji Ĉari“.

Parolante pri la dekadentoj ne estas eble preteriri silente „Tragiĉeskij Zvezrinjec“ (Tragika Bestejo) de Zinovjeva Hanibal (ŝi mortis pasintan jaron). Tio estas interesaj, iafaje kortuŝantaj per la profundo kaj beleco, paĝetoj el vivo de obstina infana animo. Balmont aperigis dikajn libron de versaĵoj sub ĝenerala titolo „Jar Ptica“, Aleksandro Blok—„Versaĵoj pri belega sinjorino“, „Senatenda ĝojo“, Valerij Brjusov—„Vojoj kaj Disvojaĵoj“, Gorodeckij „Sovaĝa Volo“, Vjaĉeslav Ivanov „Eros“.

Dekadentoj elpaŝas ĉe ni jaro post jaro pli kurage. Ili jam eligis el mallvastaj kadroj de siaj intimaj rondetoj (krujkovŝĉina) kaj nun enmetas siajn verkojn en ĉiuj dikaj ĵurnaloj. Ĉu signifas ĉi tio ilian venkon aŭ „en senfiŝejo kaj kankro estas fiŝo“? Sed ni devas konfesi, ke en la sfero de stilo lingva, dekadentoj tamen enportis sian parton da bono en la rusan literaturon.

La formo jaro post jaro perfektigas. Kiel modelon de stilisto, kiu havis grandan bruan sukceson, mi nomu Boris Zajcev. Lia malgranda libreto de rakontoj estis eldonita du fojojn en unu jaro. Krom tio la lastan jaron li skribis ankoraŭ kelkajn malgrandajn verkojn, „Majo“, „Kolono Kozov“, „Fratino“, „Amo“. Liaj verkaĵetoj estas efek-

tive belegaj. Ili enhavas ian nekaptetlan aromon de l'rintempo, de l'kareso... Li trovis ion sian, apartan, sed . . . . . sed li komencas sin kopii.

Finante ĉi tiun rapidan kaj tial nature ne plenan ĉirkaŭrigardon de la rusa literaturo de la pasinta 1907 jaro mi devas noti rakonton de Gorkij „Patrino“. Paroli pri ĝi estas malĝoje kaj dolore. Bona intenco, sed plena nesukceso en plenumado. Kun mirego ni demandas, ĉu tio ĉi estas tiu Gorkij, kiu verkis „Sur Fundo“?

Ĉu tio ĉi estas tiu M. Gorkij, kiu estis la unua hirundo de la rusa revolucio kaj tiel inspirite kantis:

„Por frenezeco de bravuloj, ni kantas gloron.

Ja frenezeco de bravuloj—jen estas saĝeco de l'vivo“.

En tiu ĉi skizo mi celis ne tiom nomi ĉiujn verkojn de rusa muzo, aperintajn dum tiu ĉi jaro, kiom noti naskiĝantajn fluadojn kaj tendencojn, kaj laŭforte komprenigi ilin. Tiel ekzemple mi ne diris pri Kuprin, kiu aperigis en mondon la lastan jaron la III-an volumon de rakontoj, pri Muĵejl—juna talenta verkisto-moraristo kaj pri kelkaj aliaj, dum ne karakterizaj por nuna momento.

Se la rusa revolucio estus venkinta, se ĝi elkondukus Rusujon al novaj politikaj formoj, doninte sekve liberecon por plua disvolviĝado de ekonomiaj fortoj de la lando, tiam bildo de la rusa reaĉeco, kompreneble estus tute alia kaj humoro de la inteligentularo kaj stato de la literaturo havus alian karakteron.

Nun do en nia literaturo ne estas loko por venkaj himnoj, ĉar niaj herooj trovis venkon en martira morto.

Nauko.

Petro Hajda 1).

## EN JASNAJA POLJANA 2).

Tio ĉi okazis antaŭ kvin jaroj. Mi fariĝis kvarklasano de eklezia seminario, kiam la ideoj de l'Tolstoj fariĝis por mi la religio, potence postulanta de mi la tujan efektivigon de mia persona vivo.

1) Presante la artikolon de Petro Hajda la redakcio opinias, ke estas necese klarigi, ke ĝi tute ne konsentas la rigardojn de aŭtoro pri persono de Lev Nikolaevič Tolstoj. Pro sia juneco la aŭtoro, kompreneble, per densa koloro ĉion priskribis; sed tiu ĉi artikolo prezentas intereson precipe pro deziro de la aŭtoro substreki la kontraŭdirojn, okazantajn inter vortoj kaj agoj ĉe tiuj ĉiuj pensuloj, kiuj, simile al Tolstoj, donas tro grandan signifon al persona influo en afero de la perfektigo de la homara societo. La legantoj, certe, kompre-

„La Regno Dia estas en ni“.

La apero de ĝia horo de neniu alia dependas, ol de homoj mem. Komencu nur ĉiu fari tion, kion ni devas fari kaj ĉesi fari tion, kion ni ne devis

nas, ke ni ne povas rilati al la granda verkisto alie, ol kun plena respekto kaj kunsento al lia nobla agado. La rilato de L. Tolstoj al esperanto, al kies ideo li donis per sia solidareco potencan subtenon, devas ankoraŭ pli forte vekigi niajn simpatiojn al la Jasnopoljana filozofo-moralisto, 80-jara lia jubileo estas baldaŭ festata de la tuta homaro. Kaj ni kompreneble ne lasos la okazon al tiu nian malfortan voĉon al salutado de l'tutmonda genio.

La Red.

2) La nomo de bieno, kie ĉiam loĝas grafo Tolstoj. Rim. de Red.

fari, por ke tuj do aperu la promesita sur la stratoj ol antaŭe ne ĉirkaurigardi, Regno Dia“ 3).

Tial parolis mia insruisto, kaj mi kun ĉu ne rampas sub piedoj ia ajn kokcunula entuziasmo komencis „fari“. zis iam senintence tion ĉi fari, mi opi-Regnon Dian. Por tio ĉi mi antaŭ ĉio niis min la plej granda pekulo kaj nur ĉesis matene kaj vespere preĝi, ĉesis miris—kiamaniere la tero tenas min fari signon de kruco kaj iradi en pre- sur si post tia terura krimo. ĝejon; mi rifuziĝis vizitadi teatron kaj La Dio tiam ne ekzistis ĉe mi, ĉiuj do dancadi, evitis la antaŭajn konatulojn, „leĝoj kaj profetoj“ unuigis en unu, precipe fraŭlinojn. „severa, sed majesta figuro de l'malju-

La servantojn pro ia kaŭzo komen- nulo, kiu malkonfesis la preferecon de cadis nomi. „Vi“ kaj donadis al ili la ma- l'bonstata klaso kaj kiu plugis en bas-



Lev Tolstoj plugas. (Pentraĵo de I. Repin).

non, kiam diris bonan tagon, alvenante hejmen por libertempo, aŭ kiam diris adiaŭ, revenante seminarion. Mi mem faris kaj ordigis mian liton, mi mem purigis la botojn.

Mi terure ekmalamis pastrojn kaj la tuton eklezian (kvankam mia patro estis merita pastro), kaj kiam Tolstoj oni ekskomunikis de la eklezio, mi la tutan semajnon post tio ĉi iradis kun fiere suprenlevita kapo, kvazaŭ kune kun Tolstoj kaj min oni ekskomunikis publi- ke.

Mi ĉesis eĉ insulti „diablo“ kaj penadis nenion koleri, eĉ nian hundon. Pirat', kiu treege tedis min per siaj karesoj. Antaŭe mi ofte batis lin pro tio je buŝego kaj kolere kriadis: „iru for malsaĝulo, nun do mi nur ĝentile kaj mallaŭte diradis: „foriru Vi, mi petas“. Jes, kiel tio ĉi ne estas strange, sed dum tiu tempo mi eĉ la hundon nomis „Vi“.

La respekttestimo al ĉiu viva atingis ĉe mi tian staton, ke mi ne alie iradis

taj ŝuoj kaj en tolaj pantolonoj la pa- trinon—teron. Mi absolute estis enami- ĝinta en tiun ĉi figuron de l'Tolstoj kaj neniam pensus ŝanĝi je li ĉiujn Madonojn kaj Venerojn.

En tiu ĉambro, kie mi dormis, pen- dis sur la muro portreto de l'grafo. Tiuj ĉi maldelikataj, vilaĝanaj trajtoj de l'vizaĝo, tiuj ĉi malsuprenpendantaj brovoj kun la regna fiereco ĉiam rigar- dadis min el nigra kadro de l'portreto kaj estis ĉiama riproĉo en mia temp- pasigado. Ofte estadis, ke, vekiginte matene, treege estis al mi dezirate dor- loti sin en lito, sed severa vizaĝo de l'grafo rigardis min kun tia riproĉo, ke mi en unu momento eksaltis el lito, rapide min vestis, nepre mem ordigis mian liton kaj iris en ĝardenon purigi la vojetojn.

Tiun ĉi okupadon mi tiam opiniis ne inda por mi: vojetoj ja en ĝardeno es- tas jam malutila lukso. Mi devas iri en vilaĝon fari malfacilan kaj utilan vilaĝan laboron kaj mi pense petis ĉe mia instruisto pardonon „por vojetoj“, promesinte al li baldaŭ veni en bastaj

3) Tolstoj—„Regno Dia estas en ni“.

ŝuoj kaj tolaj pantolonoj inter malgajaj kampoj kaj tie ĉi laboradi, laboradi ĝis sangasvito.

Iafoje venadis al mi la penso veturi en Jasnaja'n Poljana'n kaj ricevi la honoron vidi per propraj okuloj mian instruiston. Sed ŝajnis al mi, ke ne elportos mi tian proksiman ĉeeston kaj ke mi tie ĉi apud piedoj liaj mortos pro tro grandega feliĉo...

En tiu humoro mi estis, kiam fariĝis kvarklasano de la eklezia semina-

miajn apartenaĵojn (antaŭe mi forveturis sen ili).

Sed apenaŭ mi trapaŝis la sojlon de l'seminario, kial min arestis subinspektoro, alkondukis al rektoro, kaj poste ili ambaŭ enŝosis min en seminarian malsanejon, kiel psike nenormalan. Ili eĉ ordonis vesti la frenezan noktsurtuton kaj pantoflojn, sed mi decide rifuzis.

Postean do tagon, mi sub akompano de du observantoj, estis alkondukita en



Lev Tolstoj inter vilaĝanoj. (Skizo de I. Fejn).

rio. La libertempoj finiĝis, kaj mi forveturis en lernejon kun mistera antaŭsento, ke longe ne estos en miaj fortoj resti en ĝi. La antaŭsento ne trompis min: apenaŭ mi povis „treni“ unu monaton en tiu ĉi kloako de obskurantismo; fine mi ne elportis kaj unu vesperon, ne demandante la permeson ĉe estraro, mi sidiĝis en vagonon, kaj forveturis rekte en unu el kolonioj de l'Tolstoj. Konatiĝinte kun ĝiaj ordoj, mi decidis nepre fariĝi ĝia ano; dume do—returne al hejmo, por kelkaj minutoj alvenis seminarion, por raporti al rektoro, ke mi forlasas ĝin, kaj por preni

domon de miaj gepatroj kaj elpelita el seminario...

De tiu tempo pasis kvin jaroj, kaj de antaŭa Tolstojismo ne restis ĉe mi „ŝtono sur ŝtono“. Sed tamen mi kun respektogola unuanfojon rigardis Jasnaja'n Poljana'n kiam en tiu ĉi jaro mi kun veturigisto, kiun mi dungis sur stacio „Jasenki“ de Moskvo-Kurska fervojo, suprenveturis monteton, kaj antaŭ miaj okuloj malfermiĝis la vilaĝeto mem kaj akre elstaranta sur verda fundo de la arbaro du blankaj domoj de l'Tolstoj. Mi restis loĝi ne ĉe l'grafo, kiel tion ĉi faras „ eminentuloj“, vizi-

tantaj Jasnaja'n Poljana'n, sed ĉe unu vilagaĝo.

## II.

Prezentu al Vi disetendiĝintan ĉirkaŭ 100 verstoj pinglarbaron kaj en ĝies rando malgrandan vilageĝon el 60 dometoj... ĝi tuta etendiĝis en unu straton laŭlonge de dekliva monteto kaj apartiĝas de l'grafa bieno per larĝa kaj dekliva kavego.

Kiam mi la unuan fojon ekrigardis la antaŭan flankon de bieno de l'Tolstoj, malagrabla min frapis per sia, tiel dirite, burĝa stilo la ĉefaj pordegoj. Tio ĉi — du rondaj malgraciaj ŝtonaj kolonoj, kronitaj per koketoj, eltranĉitaj el lado. Precipe min incitis tiuj ĉi rondiĝantaj laŭ vento koketoj, simile al tiaj, kiaj renkontiĝas en dometoj de malriĉaj urbaj kvartaloj.

Enirinte en pordegojn, Vi vidas antaŭ vi iom irantan en monton malpuran, tutan en elfosoj, vojon, kondukantan al domo. En Jasnaja Poljana pro ia kaŭzo oni ĝin nomas „prospekto“.

Nenion grafan oni sentas. Nur sole „lawn tennis“, displanita antaŭ domo, memorigas ke tie ĉi loĝas la nobluloj.

La domo mem estas ankaŭ tre malgracia ekstere kaj malorda—interne. La meblo—ne grafa kaj ne komercista: „tiel simple“, jen kion estas dezirate diri, rigardante tiujn ĉi malplenajn ĉambrojn, kie staras modesta antikva meblo.

Se estas io interesa en domo, tio estas belegaj portretoj de grafo kaj de lia familio, pentritaj de Repin', Ge' kaj de aliaj pentristoj, vizitintaj Jasnaja'n Poljana'n. lafoje, vespere, el fenestroj de l'domo elfugas necertaj sonoj de l'fortepiano: jen ludas aŭ maljunulo mem aŭ iu el la familio.

Kiam mi la unuan fojon aliris al domo de l'Tolstoj, eksonis tre agrablaj, arĝentaj sonoj de la sonorilo. Tio ĉi—oni invitas la grafan familion kaj ĉiam loĝantajn ĉe l'grafo „eminentulojn“ al tagmanĝo: tiel estis delongtempe ĉe ili akceptite. En atendo de l'fino de tiu ĉi ceremonio, mi iris vagadi en la ĝardeno.

Ĉi disetendiĝis je 60 verstoj ĉirkaŭ grafaj domoj. En la ĝardeno estas nur unuj pomujoj kaj nenia ĉerizo aŭ pruno. En tiu ĉi jaro estas tia grandega bonariko, ke la grafino akceptis por farmo de l'pomoj 5000 rublojn.

Apud domo mem etendiĝas centjara tilia aleo. Kiam mi eniris en ĝin, ĉi al mi, ke mi ekaperis en malhela gotika templo: tiel estis tie ĉi malhele, kaj tiel majeste foriris ien en la ĉielon—per du senintermankaj muroj—centjaraj tilioj. En mezo de aleo staras verda benko kun dorso.

Oni diras, ke tie ĉi estis pripensitaj

kaj verkitaj la plej belaj paĝoj de l'„Kazakoj“.

Mi singardeme, apenaŭ altuŝatante la teron, preteriras tiun benkon, surkiu iam en poetikaj turmentoj naskiĝis bonodora Marjanka kaj bonanima onklo Eroŝka. Kaj songas, kvazaŭ iliaj ombroj nevideble ĉeestas tie ĉi inter arboj. „Demetu ŝuojn, ĉar loko tiu ĉi estas sankta“, subite alvenis al mi en kapon; mi en konfuzo foriris de interdikta benko...

Kiam mi alproksimiĝis al teraso, la matenmanĝo estis jam finita. Apatie apoginte la manon sur la krado de l'teraso, sidis iu flavruĝa, simila al hebreo, sinjoro kaj fumis. (Kiel poste montriĝis, tiu ĉi estis filo de l'grafo, Lev Lvoviĉ). Mi povis nur lin solan vidi, kvankam el-post sovaĝa vinbero, dense ĉirkaŭvolviganta la terason, aŭdiĝis diversaj voĉoj.

Mi salutis flavruĝan sinjoron kaj demandis:

— Cu oni povas vidi Lev Nikolaeviĉ?

— Oni povas, povas... — Vin demandas juna homo, sin turnis la flavruĝa sinjoro al nevidebla de mi grafo. Post tio ĉi sur la teraso eklaŭtiĝis ies malpezaj paŝoj. Mi sentis, ke tio ĉi iras al mi mem maljunulo, kaj min nevole trafis febro ĉe penso, ke jen-jen tuj mi ekvidos homon, antaŭ kiu genuas popoloj de l'Malnova kaj Nova Mondo. Al mi ial ŝajnis, ke mi ne elportos lian reĝece-severan rigardon.

Apenaŭ aperis sur teraso granda figuro de l'Tolstoj, kiam mano mia instinkte deŝiris de l'kapo la ĉapelon. Momento... kaj mi kvazaŭ formortis en estimplena saluto.

Grafo eliris al mi kun demando:

— Ĉu Vi estas la unuan fojon ĉe mi? Mi respondis: „jes, la unuan“ kaj ni iris kun li laŭ la aleo de l'ĝardeno.

Apud mi ne estis tiu Lev Tolstoj, kiela lin prezentas al si ĉiu el ni laŭ portretoj de la lastaj jaroj: severan maljunulon, kun maldelikataj trajtoj de l'vizaĝo, tipan Jasnopoljan'an vilagaĝnon. Kontraŭe, apud mi iris la plej bonanima... mi volus diri — junulo, se ne grizaj haroj de l'grafo. Jes, li estas mirinde juna ne sole anime, sed kaj fizike.

Voĉo—maldika, junula tenoreto. malpeza, gracia irado, dorlotita, sen sukcoj, ekanimita vizaĝo kaj delikataj belaj manoj. Nur senformaj botoj, el maldelikata ledo, kaj simpla rusa ĉemiso, ĉirkaŭita per rimeno parolis pri io ne-grafa.

— Vi, certe, estas revoluciisto?—demandis Tolstoj, rigardante mian studentan ĉapelon. Tiu ĉi demando estis elparolita kun tia ironio, ke mi anstataŭ respondi, nur nevole ekridis.

Grafo ankaŭ ekridetis, poste vizaĝo lia subite fariĝis severa.

— Jes, mi Vin serioze demandas: Ĉar nun la tempo estas trapasanta... ĉio tio estas fremda... Sed jen animondo, animon sian Vi povas por ĉiam pereigi... Mi tion ĉi ĉiam nun diras al junaj homoj...

Mi kun scivolo de palenteologo ekrigardis grafon, kiel elfosatajan malofataĵon, posedantan apartan, tiel dirite, jam atrofĝintan ĉe ni „organon“—animon.

— Ĉu Vi aŭdis, grafo: Regna Dumo estas dislasita? demandis mi.

— Konfesas mi, ĉio tio min tute ne interesas. La popola reprezentado tiel sin kompromitis en okcidento kaj Ameriko, ke eĉ estas ridinde aldoni al tiu ĉi fakto ian ajn signifon.

Priparolinte ĉirkaŭ 10 minutoj pri nuntempaj faktoj, mi la tutan tempon atendadis, ke jen-jen grafo diros ion genian, li do parolis la plej komunajn kaj ofte uzitajn opiniojn kaj tiel terure per tio ĉi enuigis min, ke mi petis grafon doni el lia biblioteko por kelkaj tagoj Dobroljubov.

— Mi nenian Dobroljubov konas... kiu estas tiu ĉi?

Mi ruĝiĝis pro grafo kaj rememorigis al li, kiu estas tiu Dobroljubov.

— Ĉu mi nepre devas scii lian nomon? kun ĉagreno respondis grafo,—ĉio tio do estas maleminentaj, malseriozaj verkistoj:

Cerņiŝev, Dobroljubov...

— En tiu okazo—donu al mi monografion de Andrejeviĉ pri Vi... ĝiestas nomata „Lev Tolstoj“.

— Ĉu Vi efektive Vin okupas per tiaj bagateloj? ekridetis maljunulo.

— Ĉu Vi ne legas kion skribas pri Vi la aliaj?

Grafo neige ekskuadis la kapon anstataŭ respondo kaj, kiel ekŝajnis al mi, fiere.

„Afektas li“ pripensis mi kaj eksilentis.

Ni eniris en la domon kaj grafo invitis min en sian kabineton.

Mi prezentis al mi, starante antaŭ la malfermota pordo de l'kabineto, ke tuj mi ekvidos ĉambron en detale Tolstoj'a stilo.

Glataj, sen kornico kaj sen iaj ornamoj, muroj kaj plafono.

Modesta, farita de grafo mem tavolo, sur kiu, krom plej bezona skribilaro, nenio kuŝas kaj neniam bagateloj estas dislokigitaj. Sur muroj estas penditaj „sanktaj“ objektoj: segilo, famekonata mallonga peltokaj bastŝuoj, kaj en angulo staras hakilo kaj ŝovelilo. En ĉambro odoras je ŝafa felo kaj je tiu kunmiksa el tero, pajlo kaj sterko, kiu estas apartenaĵo de ĉiu vilaga dometo kaj kiu ial precipe

plaĉas al akra kaj dilikata flarsento de Lev Nikolaeviĉ.

Ĉirkaŭe, kien Vi nur ne rigardus, estas sola „simpleco“, stilo estas detale kunmetita, nek unu burĝa streketo.

Tia estos mi pensis, kabineto de l'grafo, sed treege mi eraris.

Antaŭ ĉio Vin frapas la plej plena sengusteco. La planko ne estas kolorigita, el pinaj tavoloj, kaj ankaŭ tie ĉi Vi vidas belajn pordojn el korela betulo, en stilo m o d e r n e, kondukanta el kabineto en ĉambron de l'grafo. Apude de antikvaj molaj seĝoj sin trovas simpla, nekolorigita benko. Sur skribtablo iaj malmultekostaj bagateloj, kiel ekzemple neevitebla en la tuta Rusujo „prespapier“ el plumbo, figuranta aglon kun disetenditaj flugiloj; tie ĉe estas ankaŭ lada malnova kruĉo, ŝajnis, por memoro de l'kronado, el kiu elstaras ĉiuspecaj plumingoj kaj kraĵonoj. Sur muroj estas dispenditaj portretoj de Reskin', Henri', Gorg' kaj malnova elkolorigita gravuro de rafaela Madono.

Sur tiu muro, al kiu estas alŝovita la skribtablo, pendas longa breto, kiu estas tute plenigita per „Enciklopedia vortaro“ de Brokhaus; inter mola leda kanapo kaj skribtablo estas disetendita belega kolora tapiŝo.

Unuvorte la Tolstoja stilo tute forestas en la kabineto. Grafo invitis min sidigi kaj li mem eksidis en du paŝoj kontraŭ mi sur la seĝo. Kelkajn minutojn ni silentis kaj kvazaŭ rigardadis unu la alian.

Unua ekparolis mi.

— Lev Nikolajeviĉ! ĉu vi kiel antaŭe neigas nuntempan arton?

— Jes.

— Kaj sciencon, kaj regnecon kaj eklezion?

— Certe.

— Kaj sociajn demandojn?

— Tio ĉi do estas nur bagateloj...

— En tiu okazo—pro Dio—diru do al mi, kion Vi dezirus restigiel nuna vivo, kion Vi trovas en ĝi senpeka, bona... Kio do restos fine?

Mi sentis, ke la demando estas formulita tro akre.

Ŝajnis al mi, ke mi tuj do ekaŭdos „la kredon“ de la fondinto mem de Tolstojismo kaj pretigis min por atente lin aŭskulti.

Tolstoj leviĝis de l'seĝo kaj mont-rante per mano la ĝardenon, kiu estis vidata el la fenestro, trankvile respondis:

— Kaj jen la naturo restos... hundetoj ludas inter si, tio ĉe ne estas peka, tio ĉi estas bona... plue—falĉi, plugi en la kampo... fine, mia ama rilato al homoj kaj bestoj restos... En tiu ĉi tempo tra la ĉambro kun zumo traflugis muŝo.



Grafo kvazaŭ neatendite ion rememoris kaj, iom ruĝigante kaj sin ĝemante, diris:

— Kvankam al mi estas honte pri tio ĉi diri al vi... certe... nu, estu jam tiel. Rigardu do... mi antaŭe ĉiam sufoĝigis tiujn ĉi tedemajn muŝojn. Kaj jen hieraŭ mi kaptis en manojn du kaj singardeme ellasis ilin post la fenestron: vivu do ili... Ha, juna homo, Vi eĉ ne povas prezenti al Vi, kian li, plezuron tio ĉi faras al mi! Kaj li denove iom ruĝiĝis kaj komencis certigi min, ki al al ĝuste dirite, estas honte pri tio ĉi paroli. Tamen do, mi ne povis nerimarki sur lia vizaĝo ian memkontentecon.

Post tio ĉi la temo de nia interparolado estis ŝanĝita kaj li komencis paroladi pri Dio, pri animo, sed mi nenion komprenis el nebula parolado de maljunulo. Memoras mi nur, ke la korpon li nomis „limo de l' spirito“, multe parolis pri malriĉegeco de l' materiala vivo de l' homo kaj konsilis al mi, por „savi la animon“, forlasi la universitaton. Parolado lia estis tiom implikita kaj senordiga, ke la grafo eĉ mem eksentis tion ĉi kaj diris al mi, adiaŭante:

Jen Vi, juna homo, foriros de mi kaj pripensos: kia sensenca maljunulo... jen kaj estas peko kontraŭ proksimumo, ne bone...

— Pardonu,—diris mi, leviĝante de l' seĝo kaj iom salutante la grafon,—mi estas eĉ per tio feliĉa, ke aŭdas Vian voĉon... Grafo paciĝe ekridetis.

Mi ne detenis min kaj faris la lastan provon... peti el riĉa biblioteko de Tolstoj la bezonatajn librojn.

— Pardonu, grafo, mian tedecon: ĉu ne povas mi ricevi ĉe vi por kelkaj tagoj Mihajlovskij?

La vizaĝo de l' majunulo subite akceptis severan, instruistan mienon.

— Ha, kia Vi estas malbonigita juna homo... bedaŭras mi Vin: kial Vi perdas Vian multekostan tempon por tiuj ĉi bagateloj?

— Pardonu, Lev Nikolaeviĉ, por mi do tio ĉi estas altaĵoj de l' pensoj „Alpoj“... Tolstoj malestime ekridetis.

— Jen, tio ĉi estas formikaj amasetoj—ĉiuj Viaj Mihajlovski'oj kaj Dobroľubov'oj... triviala liberala babilado.

— Sed kial do ili havas tian kolosan sukceson ĉe ni?

— Tute simple, ĉar ili estis sekretaj revoluciistoj... Kaj kio estas al mi plej ĉagrene: jen tiaj malbonigitaj junaj homoj, kiel Vi, traleginte ĉiujn bagatelojn, opinias—ni estas kleraj... Malkleruloj estas Vi, plej maldelikataj malkleruloj...

Ĉu Vi legis Ĉanning'on? subite sin turnis li al mi kun la demando, rekte rigardante en miajn okulojn.

— Ne.

— Kaj Russo'n, kaj Mark'on Aŭrelion.

— Ne.

— Vera malklerulo... mi treege Vin bedaŭras—por kio Vi perdas Vian tempon...

— Sed kiun do Vi, grafo, el rusaj verkisoj kalkulas „Alpoj“? Ĉi iom primeditis.

— Jen Puŝkin', Dostoevskij'... Tjut-ĉev'... Gercen', kiam li disreviĝis en revolucioj (kvazaŭ rememoris li, kun paŭzoj nomante unu post alia).

— Vi sekve ne donos Mihajlovskij'n?— ankoraŭ unu fojon petis mi.

Grafo nur neige ekskuis la kapon kaj svingis per manoj, kvazaŭ li per tuta sia grandega korpo forpelis pikintajn lin abelojn.

Por adiaŭo li prezentis al mikelkajn lastajn siajn broŝurojn pri nuntempaj temoj.

Pro ĝentilo, mi ilin prenis, dankis kaj, ne disvolvinte, redonis ilin al li en la sekvinta revido, kvankam kaj trancis ĉiujn—pro estimo al maljunulo.

Dum la tuta tempo de nia interparolado mi kun plej granda estimego rigardadis maldikajn, belajn manojn de l' grafo, kiuj kreis tiom da mirindaĵoj en la poezio. Kelkajn fojojn mi ĉirkaŭprenis la nevenkebla deziro ek-kapti tiujn ĉi geniajn manojn kaj sentime ilin kisadi.

Fine, eniris lakeo kaj raportis, ke la ĉevalo estas selita.

Ni eliris al teraso, kie jam atendis grafon lia amata malhele-bruna ĉevalo „Zaporojec“.

Grafo ensaltis sur ĝin kun junula facileco. La ĉevalo ial subite ekronkis kaj leviĝis sur siaj postaj piedoj.

— Ho ve, ĝi mortigos!.. estis ekaŭditaj kelkaj virinaj voĉoj.

Li amike kaj molege batetis la ĉevalon sur la kolo, alspronis ĝin kaj sendinte al ni ĉiuj aeron kison, sin kaŝis post la arboj de l' ĝardeno.

En tiu ĉi tempo aliris al mi la bofilo de l' grafo, princo Obolenskij, nigrharulo, ĉirkaŭ 40 jaroj, de malgranda statur.

Ni ial tuj komencis paroladi pri vilaĝana movado. La princo per karaktera akcento de „beaumontain“ apatie ekbalbutis:—Jen nun ĉiuj krias: „Teron kaj liberecon!“ sed tamen tio ĉi estas nur malsaĝa frazo... la vilaĝanoj estas simple tiel malriĉaj, ke fariĝis mallaboremaj: ili eĉ ne povas kaj la nunan teron prilaboradi.


— Ne,—rediris mi,—jen Jasnopoljan'anoj volis jam plugilojn aĉeti, ili opinias, ke la Dumo donos al ili teron. Kaj nun, kiam Dumon oni dispelis, ili kiel antaŭe fosos la teron per ĝissuperakvega plugilo, ĉar por duondesatino da partigita tero ne estas bezone eĉ la plugilon aĉeti.

— Mi do diros al Vi—kun tia sama apatia tono en la voĉo daŭrigis la princo—ke la vilaĝanoj nun simple eldrolotiĝis: ili nur scias drinki, kriadi kantojn, insulti... ili laboras senzorge... ne tial, kial estis ĉe niaj praavoj. Se oni deprenas de ili kaj tiun profiton, kiun nun donas al ili la bienhavanto, ili nepre pre malsato kiel bestoj pereos...

He!—pripensis mi, reveninte en la vilaĝon... tie ĉi loĝas servutistoj.

Al mi fariĝis ĉagrene, precipe kiam mi rememoris, ke en oktobro de la pasinta jaro pro tio, ke la najbaraj vilaĝanoj hakadis la arbaron, grafo alvokis en sian bienon la kozakojn.

Trad. A. Sensajev.  
(Daŭrigo venos).



A. Novikov.

## KIO FARIĜOS, SE ORO PERDOS SIAN VALORON 1)?

La oron aspiras nun la tuta homaro, ĉar per la oro oni povas ĉion aĉeti: kaj fizikan bonstaton, kaj spiritajn ĝuojn, kaj komunan honoron, kaj sanon, kaj feliĉon, kaj virinan favoron... La oro senpere nenion donas al la homo, ĉar kuŝante inter la oro, oni povas morti pro malsato, sed, tamen, okazis tiel, ke homoj interkonsentis, kondiĉis per kvanto de la oro mezuri valoron de ĉiu objekto. La diversaj regnoj komencis fari monerojn el la oro, kaj valoro. Sekve, ankaŭ internacia signifo de tiuj ĉi moneroj fariĝis malsamaj pro malsama kvanto da oro, enhavata de ili; tiel, ekzemple, rublo enhavas 17,4 dolojn da pura oro kaj tial ĝi estas pli kara, ol franko ĝuste en 2<sup>2</sup>/<sub>3</sub> fojojn, ĉar la lasta enhavas nur 6,5 dolojn, t. e. 17:22/3.

Ni eĉ ne povas prezenti al ni la koston de ia ajn objekto, ne defininte, al kia kvanto da oro estas konforma tiu ĉi objekto.

Kio kaj kiome estas pli kara, ĉetveriko da aveno aŭ paro de botoj? Neniu povas tion ĉi diri, ne defininte koston de

la unua kaj de la dua, t. e. ne komparinte ilin kun kosto de la oro.

Homoj pensis, ke tiel estos eterne, ke ĉiam kaj ĉion oni povos taksii per komparo kun certa kvanto da oro de moneroj.

Tiel oni opiniis ĉar oro estas ĥemia elemento, alie diri, tia korpo, kiu jam ne estas ĥemie dividebla, kaj pro tio ne povas esti arte farita. En mezepoko alĥemiistoj penadis trovi sekreton de l'ricevado de la oro el malmultekostaj ŝtofoj. Sed la plej nova scienco, ĥemio, pruvis, ke fari arte oron ne estas ebla—la oro, ĝi diras, estas simpla korpo. En nerefutebla maniero tion ĉi ankaŭ konstatas la granda rusa ĥemiisto Mendelejev.

Neniu, cetero, tre penigis pri tio sian kapon. Pligrandiĝas kun progreso kaj kun kreskado de la loĝantaro de terglobo ankaŭ la kvanto de riĉaĵoj—kompare kun tio pligrandiĝas ankaŭ la nombro de lokoj, kie oro estas akirata, pliboniĝas ankaŭ la kvanto de bezona al homoj nobla metalo.

Oni opiniis, ke tiel estos... eterne... Sed longa vico de eltrovoj en regiono de l'ĥemio kaj en apudaj regionoj de l'scienco, la eltrovoj, kunligitaj kun nomoj de Le-Bon, Crookes, Becquerel, Curie, Ramsay, lord Kelvin,

1) Что произойдетъ, когда золото обезцѣнится? Эта статья помѣщена на русскомъ языкѣ въ № 2 «Вѣст. Зн.» подъ заглавіемъ: «Демонетизація золота»

kaj aliaj, igas pensi, ke niaj antaŭaj komprenoj pri hemiaj elementoj estas tute malgustaj, ke nun jam ne povas havi lokon kredo pri ilia neŝanĝeco, kontraŭe, la atomoj hemiaj estas submetitaj al leĝo de la evolucio, leĝo, simila al tiu, kiu potencas en mondo organika; krom tio, ĉiu atomo havas sian rondon de disvolvigo, sian komencon kaj sian finon de ekzistado.

Tial ne estas mirinde, ke science-pruvita fakto pri aliformigo de unuj elementoj en aliajn devigis la multajn rememori pri antikva revo de alhemistoj, esperintaj trovi manieron de l'ricevado de la oro el aliaj mineraloj.

Kaj, oni devas konfesi, ke nun la sama revo jam ne ŝajnas esti tiel neefektivigebla. Kaj tial ĉiu pensema homo, ĉiu interesiganta pri socialaj sciencoj kaj, private, pri tiuj ekonomiaj interrilatoj, kiuj estas ligitaj kun nuna sistemo de komercaj—ŝanĝado kaj kun valora unuo,—ne povas ne doni al si demandon: kio fariĝos, se unutage la mondo ekkonos, ke oro povas esti arte farita? Eĉ supozu ni, ke en komenco la akirado de la oro per hemia vojo estos malprofita; tamen, ĉu estas inde paroli, ke tiu stadio estos, ĉiokaze, nelongedaŭra? Ĉiuj hemiistoj, mehanikistoj, inĝenieroj, sciencamantoj—ĉiuj sin jetos al plibonigo de l'manieroj de orakirado. Tiam neniu estos, kiu konstruus domojn, trametus fervojojn, funkciligus fabrikojn, preparus kuracilojn.—Ĉiuj farados oron!

Ĉu oni povas dubi, ke ĉe tia infera konkurado pli ofte kaj pli ofte oni farados eltrovojn, celantajn plimalkarigi oron. Je komencos aperadi produktojn de malkara oro... dum ĝin oni ne ĉesos akceptadi.

Tiam ĝi fariĝos la objekto de fabrika produktado...

Tiam oni preparados orajn hufojn, orajn plugilojn, orajn tegmentojn.. ja oro estas pli fortika, ol fero: ĝi ne rustiĝas! Tamen, oni bezonas ankoraŭ ekzameni, ĉu taŭgas ĝi por la plugiloj?

Sed iru ni, leganto, el kabineto de hemiisto kaj el orfara produktoje—ĝustokaze, eĉ nun tio ĉi jam ne estas nur simpla fantazio—en kabineton kaj eĉ en animon de Rotschild (Rotschild).

Ĉu vi estas certigitaj, ke Rotschild, kiam li tralegis pri eltrovo de Ramsay, ne sulkigis sian vizaĝon?

Penso pri tio, ke oron ankaŭ oni povos fari, sendube, kiel najlo eniĝis lian kapon. Li certe forpuŝadis ĝin, kredigante sin, ke litio, kiun faris Ramsay el la kupro, ankoraŭ estas ne oro kaj ke, krom hemia neebleco,

ekzistas iafoje ankaŭ grandaj teknikaj malfacilaĵoj.

Jes, sed tamen, li pensas, miaj riĉaĵoj ne estas tiel absolute neŝanceleblaj, kiel mi pensis. Nun mi estas caro de l'caroj... Sed sufiĉas, ke ia malpura hemiisto—fi, eĉ eble socialisto!—eltrovu, eĉ okaze, malbenitan sekreton... Kaj mi—nenio! mi—lasta el la homoj! Sed, efektive, kio fariĝos, se oro perdos sian valoron?

Ja 99% de mia miliarda have konsistas el la oro!

La oron ŝuldas al mi la regnoj de l'tuta terglobo... Kaj ĉio tio ĉi fariĝos nenio... Do per obligacioj kaj rentpapiroj kvankam oni kamenon hejtu! Cetere, mi havas kelkajn bienojn, kaj palacojn, kaj karajn objektojn... Ĉu ne devas mi aĉeti nun, dum estas trankvile, eble plej multe da tio ĉi? He! tio ĉi ankaŭ estas malsaĝaĵo! Nu, kion, ekzemple, kostos mia bieno sen oro? Ekzemple, bieno estas riĉa, sed botojn, ekzemple, mi ne havas. Se oni sin turnos, ekzemple, al botisto. Donu, frato, paron de botoj, mi do al vi desatinon—estu tiel!—da kampo donos,—ja povas do li al mi diri: nun la bienoj nenion kostas, nun botoj estas pli karaj; fordonu por paro la tutan bienon... Ja ĉiu fordonos! nevole fordonos! Por kio do taŭgas ĉe ŝanĝa komercado la bienoj kaj muzeoj.

Tiel pensas Rotschild! Kaj li estas prava. Tamen, afero estas tiela, ke ne sufiĉas pravi eblecon de arta farado de la oro, por ke jam efektive oni povu fari ĝin! Malfacile estas prezenti al si tiun mirindegan revolucion, kiun faros eltrovo de arta farado de la oro! Regna potenco ĝis nun ĉie kutimis esti fidela sklavo de la kapitalo tiom, kiom reprezentantoj mem de l'sama potenco ne estas kapitalistoj. Kapitalo, kiel ni komprenas ĝin nune, en okazo de eltrovo de artefarita oro, jetiĝos al regna potenco samtempa: helpu, diros ĝi, per siaj bajonetoj konservi al mi mian potencon, miajn rajtojn! Kiajn rajtojn? Samajn, kiujn vi ĉiam defendadis: miajn de antikve apartenantajn al mi rajtojn, apogitajn sur posedado de la oro.. Iru for, respondos regna potenco. Oro nun nenion kostas. Kaj mi mem ne konas, kie estas la kapitalo, kie—riĉaĵoj; al kiu mi devas servi—mi ne konas. Mi mem perdis kapon...

Falis ĉiuj miaj fundamentoj. Grandajn malprofitojn vi ne evitos. Provu, pli bone vi faros, serĉi ion, per kio oni povus anstataŭigi la oron. Necese ja estas havi unuon de l'valoro por mezuri kapitalon. Alie—eĉ estas ridinde aŭ eĉ terure diri—kapitalo ja ne ekzistos en nuna senco de tiu ĉi vorto, sed oni havos provizon da pano, da diversaj objektoj, ekzistos domoj, sed kosto, bazara kosto por ĉio tio ĉi ne ekzistos.

Kaj aĉeti ion oni ne havos per kio! ja oro nun havas nenian valoron, papermono do sen oro tute nenion kostas. La fabrikoj ĉesis funkciadi; ĉar laboristoj oron ne akceptas. Ni postulas, al si objektojn de konsumo. Sed objektojn de konsumo havas ne fabrikantoj, sed kamphavantoj kaj butikistoj. Tiu ĉi ne donos! Unuo de l'valoro mallestas! Miaj oficistoj diskuris, la militistaro pereis... Ĉu mi havas eblon helpi al vi?

Kaj ĉio tio ĉi estus nome tiel, se subite estus trovita maniero de arta farado de la oro ĉe kondiĉo de l'kompara malkareco de sama produktado. Sed oni devas opinii, ke tiu ĉi fariĝos alie. Inter ricevo de unua miligramo de hemipura oro kaj anstataŭigo de fero per ĝi, malgraŭ ĉiuj penadoj de l'homaro, pasos certa periodo de tempo. Dume, kapitalistoj konsiderados kiemaniere travivi katastrofon. Al kapitalisto ĉio servas: kaj scio, kaj saĝo, kaj scienco, kaj fizika forto. Kaj jen, dum hemiistoj sin ĵetos akiradi oron, aliaj scienculoj, juristoj, ekonomiistoj ĉion faros por savi kapitalistojn. Antaŭ ĉio oni penados trovi novan mezurilon de valorajoj anstataŭ oro. Jam io en sama regiono estas farita, sed malcerte tiuj ĉi proponoj, kiujn ni konas, havas ian realan signifon. La oron kvazaŭ naturo mem antaŭdifinis esti mezurilo de la valorajoj, ĉar ĝi posedas ĉiujn ecojn, kiuj nome taŭgas por tio ĉi. Oro estas la plej fortika elemento, tre malfacile oksidata kaj tial neperdanta sian valoron pro eksteraj fizikaj kondiĉoj, ne estas simila al aliaj elementoj. Ĝin oni povas distingi de ĉiuj elementoj, kaj pro tio ĝin malfacile estas falsi. La oro estas malofita en naturo elemento, sed, tamen, akirata en kvanto sufiĉa por celoj de komercaĵŝanĝo. Per kio do ĝin anstataŭigi? Oni proponadis platino; sed da platino ni havas strange malmulte, ĝi estas laŭ koloro simila al arĝento, al plumbo, al stanio, al aluminio. Laŭ pezo al platino proksimiĝas alojaĵo de plumbo kaj arĝento, sekve, platinon, facile estas falsi. Anstataŭigi oron ĝi ne povas. Oni proponadis radiumon, sed tiu ĉi propono tute ne estas prospera. El radiumo ne estas ebla fari monerojn, ĝin oni devus porti en skatoleto en la plej malgrandaj kvantoj, kaj pro tio ĉe pagoj kaj akceptoj de radiumo en senco de mono, oni ne povus konvinkiĝi pri ĝia konstanteco.

Pine, ebleco de aliformigo de unu elemento en alian, evidente, estos komuna al ĉio, kio estas elektota kiel mona unuo. Kia ajn elemento estos elektita anstataŭ oro, oni tuj ĵetiĝos ĝin fari, kaj, kredeble, oni prosperos. Preni kiel monon la brilantojn kaj multekostajn ŝtonojn ankaŭ ne estas

eble, ĉar ilin jam nun oni povas falsi, kaj, krom tio, ilin oni devus ĉiun fojon antaŭ uzo pesi. Sin turni al pacoj de ledo, kiel estis en profunda antikveco, signifus anstataŭigi la realan valorajon, uzatan kiel unuo de komparo, per kondiĉaj signaj, ĉar inter pecetoj ledaj kaj papermono ekzistas nenia diferenco.

Sed, ĉu ne estas eble uzi la asignatojn, t. e. papermonon? Interkonsentu regnoj kiom da sama mono ĉiu regno havas rajton ellasi komence kun celo sen interrompo anstataŭigi la oran monon per novaj asignatoj! Sed ĉu oni povas revii pri simila propravola interkonsento? Kion akcepti kiel fundamenton? kian eliran punkton? Grandon de l'teritorio, kvanton da tersupraĵo? La Francujo, kaj Italujo ne konsentos. Krom tio, tersupraĵoj diferencas inter si laŭ siaj ecoj: siberiaj marĉejoj kaj kaŭkaza ĉebordo ne estas kompareblaj. Akcepti kvanton da loĝantaro? Denove ne estas eble, ĉar estas popoloj riĉaj kaj malriĉaj: la riĉaj opinios sin ofenditaj. Akcepti nunan staton de financoj, de regnaj ŝuldoj, de buĝetoj kaj de komercaĵŝanĝo inter regnoj—denove oni ne povas: ekprotestos malriĉaj landoj, kiel Rusujo. Se du kapitalistoj ofte ne povas kvitiĝi sen juĝo, kion do diri pri tia interkonsento, kiu devas kontentigi ĉiujn landojn? Ĝi, certe, ne estas ebla sen milito, kondukota ĝis lasta ekstremo, sen milito universala kaj finiĝonta nur per solo: per plena universa hegemonio de la plej forta regno ĉar kiajn ajn ligoj formiĝus, pri ĉiuj demandoj estas ebla interkonsento, pri tiu do sama—nenia!

Ankoraŭ estis proponoj: kiel unuon de valoro akcepti la homan laboron. Kaj riĉeco de morgaŭa tago dependas de hodiaŭa.

Se laboras malriĉa lando—ĝi fariĝos riĉa. Se ne laboras riĉa lando—ĝi malriĉiĝos. Efektive tiel.

Sed kiamaniere mezuritiun ĉilaboron? Je laboro influas la kulturo, klereco. Do ne estas eble ĉion tion ĉi fiksi. Denove oni bezonos la neblajn internaciajn konsentojn. Oni proponadis laboron de la lando en nia centjaro de la elektro mezuri laŭ kvanto de akirata elektra energio. Estu, oni diras, sama energio kiel mono. Anstataŭ rublo, franko, marko, dolaro estus skribita: tiom-aŭ-tiom kilogram-horoj. Oni parolus: mi pagis por domo duon-milionon da kilogram-horoj, kaj por botoj—100 kilogram-horojn. Tiu ĉi propono ŝajnas esti originala kaj sufiĉe gravan rolon donas al elemento de laboro, kiel al movanto de la kapitalo, sed tie ĉi ankaŭ oni aŭdos kontraŭdirojn: pro kio devos esti pli felikaj Svisujo, Norvegujo kaj ĉiuj aliaj monthavaj landoj kompare kun tiuj ebenaĵoj? Ja al ili naturo

mem plifaciligas la produktadon de elektra energio. Unuvorte, kiel ajn oni penus, sed solvo de l'demando pri unuo de valoro prezentas grandegajn malfacilaĵojn. Estas eble, ke nomigitaj kapitalo kaj scienco solvus tiun ĉi problemon, kvankam kun grandegaj oferoj kaj post sangverŝiĉaj a militoj, sed sur la scenejon devos aperi nova faktoro. Tiu ĉi faktoro—laboro.

Ĝi antaŭlonge batalas kun kapitalismo kaj ĉiam restas venkata, ĉar ĉu oni povas nomi prospero tiajn grierojn, kiujn ĝi ricevas tie-ĉi aŭ tie? Tion, kion almitis la laboro, ofte denove forprenas la kapitalo. Kaŭzo de malvenkoj de laboro estas neorganizeco de la laboristoj, dume por kapitalistoj estas multefoje plifacile agi kune pro tio jam, ke estas malmulte da ili, ke sur ilia flanko troviĝas la scio, ke regna potenco, t. e. forto, ankaŭ estas en iliaj manoj. Por malkune efikanta laboro la batalo kun unuigita kapitalo ne estas gajnebla. Estos stato alia tiam, kiam kapitalistoj mem malunuigos, perdinte oron, kiel mezurilon de l' valoro, kiam lingvo de l' kapitalistoj perdos sian kompreneblecon por mem parolantaj ĝin, kiel dum Babilona turkonstruo, kiam sorto puŝos unujn kontraŭ aliaj... Ĉu oni povas dubi, ke tiu ĉi terura bato,

farita al kapitalismo, kuraĝigos tiujn, kiuj de ĉiam kutimis fleksi sian kolon? Tumulto en vicoj de l' kapitalistoj unuigos laboristojn. Komenciĝos giganta batalado de l' nova socia konstruo kun tiu malnova. Al kia rezulto venos la sama batalado? Ĉu homaro sukcesos aranĝi al si vivon plifeliĉan, kaj ĉefe, pli justan?

Kiu do povus respondi tiujn ĉi demandojn? Sed estas evidente, ke farto de l' kapitalo ne povas malaperi de l' scenejo sen terura kataklismo.

Dum centjaroj la homoj adoris la oran, bovidon. Ili diigis ĝin. Ĝi estis fonto de la plej granda feliĉo de izolaj homoj kaj de la plej teruraj suferoj de l' homaj amasoj. Kaj subite la sama dio fariĝos nenion signifanta, al neniu taŭga idolo... Tiam fonto de l' feliĉo de unuj kaj de malfeliĉo de la aliaj plu ne ekzistos. Tiam neevitebla estos la retaksado de ĉio ekzistanta en la mondo. Kaj ĉio tio ĉi unutage povas estiĝi sur fundo de la retorto de ia modesta scienculo! Sed povas esti, ke oni sukcesos arte fari nur kupron, feron, arĝenton... Nobla do metalo ne estas arte farebla? Eble, eterna estas la dio—ora idolo? Kiu do konos!

Tradukis  
M. Keretkij.



Перець \*).  
МОЛЧИ.

Стихотворение  
въ прозѣ.

Небо покрыто съ-  
рыми, свиндовыми  
тучами. В вѣтеръ  
дуетъ и качаетъ го-  
лыя деревья. По  
земль прошлась  
острая коса и ос-  
тавила лишь нѣ-  
сколько жалкихъ  
стебельковъ. Земля  
оголилась и опу-  
стѣла... Идетъ су-  
ровая зима!

Тогда только  
опомнилась роза и  
показалась изъ-  
подъ земли, одинокая,  
на кочкѣ, на  
голомъ полѣ!

Она была пунцово-красная и дрожала, и тряслась отъ холода.

Она вытягивала свои длинные, слабые лепестки, что-

Perec \*).

SILENTU

El hebrea lingvo.


(Fantazio).

La ĉielo estas kovrita de grizaj, plumkoloraj nuboj. Vento blovas kaj balancas nudajn arbojn. Sur la tero pasis akra falĉilo kaj restigis nur kelkajn mizerajn trunketojn. La tero fariĝis nuda kaj dezerta... Venas severa vintro!

Nur tiam rekonsciĝis la rozo kaj aperis ella tero, sola, sur malebenajo sur nuda kampo!

Ŝi estis punce-ruĝa kaj tremis, kaj skuis sin pro malvarmo.

Ŝi etendis siajn longajn, malfortajn folietojn por altiri



\*) Краткая биография и портрет Перца будут помещены въ слѣдующемъ №.

\*) La mallonga biografio kaj la portreto de Perec estos presitaj en la sekvanta numero.

бы привлечь къ себѣ теплый и свѣтлый лучъ. Напрасно! Слишкомъ поздно.

Гдѣ-то, въ другомъ мѣстѣ теперь лѣто! Въ другомъ краю начинается новая жизнь, новыя надежды, новыя радости, новое веселье! Гдѣ-то въ другой странѣ новыя, свѣжія розы... но здѣсь все должно погибнуть.

Зима, ангелъ смерти идетъ!

Его дыханье—морозъ, паръ отъ его дыханья — снѣгъ...

„О Боже“, плачешь роза, „сжался надо мной! Я такъ молода, я такъ хочу жить... Почему прячется отъ меня солнце? Почему прежде времени губить меня морозъ и засыпаетъ снѣгъ?“

Почему я должна умереть, вѣдь я еще не жила! Почему я должна уйти изъ этой жизни, не согрѣтая, не озаренная ни однимъ солнечнымъ лучомъ, не переживъ ни одной счастливой минуты?

Молчи! просвисталъ злой вѣтеръ и засыпалъ плачущій цвѣтокъ пылью и гнилыми листьями...

И, живую, овъ ее похоронилъ!

Перев. съ еврейскаго  
Атласъ и Френкель.

al si varman radion. Vane! Tro mal-frue!

Je, en alia loko nun estas somero! En alia lando komenciĝas nova vivo; novaj esperoj, novaj ĝojoj, nova gaje-co! le en alia lando estas novaj, freŝaj rozoj... sed tie ĉi ĉio devas pereii...

La vintro, anĝelo de l' morto venas!

Lia spirado estas frosto, vaporo de lia spirado estas neĝo...

„Ho Dio“,—ploras la rozo,—„kompatu min! Mi estas tiel juna, mi tiel volas vivi!.. Kial kaŝiĝas de mi la suno?“

Kial antaŭtempe pereigas min la frosto kaj surŝutas la neĝo? Kial mi devas morti, mi ja ankoraŭ ne vivis? Kial mi devas foriri el tiu ĉi vivo, ne varmigita, lumigita de neniu suna radio, travivinte neniuminuton?!

Silentu! ekfajfis kolera vento kaj surŝutis la plorantan floreteton de polvo kaj putraj folioj...

Kaj, la vivan, ĝi entombigis larozon!..

Esperantigis

V. L o ' k o .

**Взаимопомощь  
читателей.**



**Reciproka helpado  
de legantoj!**

Ставя себѣ цѣлью объединеніе читателей въ одну дружную идейную семью, проникнутую чувствомъ взаимопомощи, пмѣющей въ виду облегченіе задачи личнаго и общественнаго совершенствованія, редакция «Вѣстника Знанія» рѣшила ввести и въ „Espero“ отдѣлъ взаимопомощи читателей. Распалась на 4 подраздѣла: общій, молодежи, спорныхъ вопросовъ въ жизни и нравственности и научной перепишкѣ, „Взаимопомощь“ охватываетъ значительную часть духовныхъ запросовъ читателей и въ значительной степени служить даже и для взаимной матеріальной поддержки членовъ той духовной семьи, которую составляютъ наши постоянные читатели. Теперь послѣ притока новыхъ силъ со всего цивилизованнаго міра, гдѣ esperanto успѣлъ уже цустивать прочные корни, наша семья, не сомнѣваемся, станетъ богаче духовными запасами, а потому и польза отъ взаимнаго общенія ея членовъ между собою и редакцію возрастетъ сторицею.

Havante la celon unuigi la legantojn en unu amikan idean familion, penetrigantan de sento de reciproka helpado intensanta faciligi la taskon de propra kaj societa perfektigo, la redakcio de „Vjestnik Znanja“ decidis enkanduki en „Espero“ la fakon de reciproka helpado de legantoj. Konsistante el 4 subfakoj: ĝenerala, de junularo, de postulantaj la disputon demandoj de l'vivo kaj moralo, kaj de scienca interkorespondado, „La reciproka helpado“ enhavas la plej grandan parton de spiritaĵaj pridemandoj de legantoj kaj en plej signifa grado servas ankaŭ kaj por reciproka materiala subteno de anoj de tiu spirita familio, kiun faras niaj ĉiamaj legantoj. Nun post alfluo de novaj fortoj el la tuta civilizita mondo, kie esperanto prosperis jam forlike enradikiĝi, nia familio, ni ne dubas, fariĝos riĉa de spirita provizo, kaj tial ankaŭ la utilo de reciproka komunikado de ĝiaj membroj inter si kaj Redakcio, kreskos centoble.

Skribu, koligoj-legantoj, unu al aliu pri ĉiuj demandoj, ekscitantaj la plej noblan par-

